KOLEKTOJ DE „ĈIRKAŬ LA MONDO“

ESPERANTO-TEATRO

— Kajero 1 —

Eldonigita kun S-ino Marie Hankel
de
Prof-ro D-ro Siegfried Lederer

La milionheredaĵo

Komedio en unu akto
(laŭ rakonto de Oskar Klaussmann) de

Johannes Kirschen.

(Esperantigis la Grupo 7 en Dresden)

Prezo: 0,150 Sm. (0,30 Mark)

La teatraĵoj publicitaj en tiu ĉi kolekto estas je la dispono de le esperantistaro. Oni bonvolu nur sciigi min ĉiam pri iliaj prezentadoj kaj pri la sukcesoj atingitaj.
Prof-ro D-ro Siegfried Lederer
Prag-Weinberge, Nerudagasse 4 (Bohemujo, Aŭstrio)

Heckners Verlag, Wolfenbüttel

ADER & BOREL G.m.b.H.
ESPERANTO-VERLAG VERLAGS-ANSTALT
DRESDEN-A.1. STRUVESTR.40.

Eldonejo:

Heckners Verlag, Wolfenbüttel

(Germanujo)

Bildolibro sen bildoj. De H. Chr. Andersen. El la dana originalo tradukis Prof-ro D-ro S. Lederer. Kun la portreto de Andersen, bele bindita . . . 1,— Mk. = 0,500 Sm.

Sufero. Fabelo de Carmen Sylva (Elisabeth, reĝino de Rumanujo.) Originalo germana; traduko esperanta, ses tradukoj (angla, franca, hispana, itala, pola, rumana) fariĝintaj el la traduko esperanta. Eldonigis Prof-ro D-ro S. Lederer . 0,80 Mk. = 0,400 Sm.

Minna de Barnhelm. Komedio en kvin aktoj de G. E. Lessing, esperantigita de Adolf Reinking 1,25 Mk. = 0,650 Sm.

Gustaf Vasa. Historia dramo en kvin aktoj de Reinhold Schmidt 1,50 Mk. = 0,750 Sm.

DONACO DE FAMILIO
RODOLFO BOLLA

KOLEKTOJ DE „ĈIRKAŬ LA MONDO“

ESPERANTO-TEATRO

— Kajero 1 —

Eldonigita kun **S-ino Marie Hankel**
de
Prof-ro D-ro Siegfried Lederer

La milionheredaĵo

Komedio en unu akto,
(laŭ rakonto de Oskar Klaussmann) de

Johannes Kirschen.

(Esperantigis la Grupo 7 en Dresden)

Prezo: 0,25 Sm. (0,50 Mark)

La teatraĵoj publicitaj en tiu ĉi kolekto estas je la dispono de le esperantistaro. Oni bonvolu nur sciigi min ĉiam pri iliaj prezentadoj kaj pri la sukcesoj atingitaj.
Prof-ro D-ro Siegfried Lederer
Prag-Weinberge, Nerudagasse 4 (Bohemujo, Aŭstrio)

Heckners Verlag, Wolfenbüttel
1911

ITALA
ESPERANTO-FEDERACIO
— BIBLIOTEKO —

PERSONOJ:

Sinjorino Arnsfeld, vidvino.

Berta, ŝia filino.

Ŝnorke, konrektoro.

Fritz von Bielau, sub la nomo asesoro Fiŝer.

Helene, servistino ĉe Arnsfeld.

La loko de la agado: malgranda banurbo.

La tempo: la nuntempo.

Scenejo: en la mezo sofo, antaŭe tablo kun aktaĵoj. Apud la fenestro maldekstre labortableto, dekstre libroŝranko. La pordo maldekstre kondukas en ĉambron, la pordo dekstre en kuirejon kaj la meza pordo en vestiblon.

UNUA SCENO.

S-ino Arnsfeld (serĉas en la skribaĵoj, kiuj estas amasigitaj sur la tablo): Strange, mi ne trovas la skribaĵon.

Berta (ĉe la fenestro okupata je kudrillaboro): Kian skribaĵon vi opinias, panjo?

S-ino Arnsfeld: Sed, mi do ĵus diris tion al vi.

Berta: Eble mi ne aŭdis tion.

S-ino Arnsfeld: Vi estas strange distrita, hodiaŭ! La finlandan aktoskribaĵon.

Berta (iras dekstren al la ŝranko, malfermas ĝin kaj elprenas grandan, dikan aktpaketon, kiun ŝi transdonas al sia patrino): Jen ĝi estas, patrino!

S-ino Arnsfeld (folias kelke da tempo ekscitate en ĝi. Subite severe al Berta): Mi ne komprenas, ke vi estas kapabla, lasi serĉi sole vian maljunan patrinon per ŝiaj malfortaj okuloj.

Berta: Mi ne volis malhelpi vin, patrino! — Vi tute ne devas eksciti vin senutile per tiuj ĉi aktaĵoj. Tio havas do nenian sencon.

S-ino Arnsfeld (indigna): Nenian sencon! Infano, ĉu vi estas freneza? Nenian sencon, se estas demando pri milionoj; pri milionoj, mi diras al vi. Mi prikalkulis tion hieraŭ. La heredaĵo ja estas nur unu miliono, sed se ni alkalkulas la procentojn de kvardek jaroj, la sumo devas esti pli ol duobliĝinta. Du milionojn, infano, du milionojn! (Ŝi iras ekscitite tien kaj reen.)

Berta: La tuta afero estas trompo; kredu tion! Nur antaŭ ne longe en artikolo la holanda registaro avertis je ĉarlatanoj, kiuj promesas riĉajn heredaĵojn al parencoj de mortintaj homoj en Orient-Hindujo.

S-ino Arnsfeld (kunfrapas la manojn super la kapo): Kiu rakontis tion al vi? Kie vi legis tion?

Berta: Sinjor' konrektoro alportis gazeton antaŭ nelonge —

S-ino Arnsfeld: Nu, kredu, mia infano, nenia gazetartikolo povas ŝanceligi mian kredon; ĝi estas tro firma. La familio de via patro havas pretendon je tiu ĉi heredaĵo de preskaŭ kvardek jaroj. Onklo de l'avo de via patro, ia Eugen Arnsfeld elmigris Orient-Hindujon en la komenco de la antaŭa centjaro kaj tie li mortis autaŭ proksimume kvardek jaroj kiel riĉega viro, ne postlasante heredantojn. La holanda registaro prenis nun la heredaĵon, ĝis la heredantoj anoncos sin. Jam via avo, la patro de via patro . . .

Berta (interrompante): Mi tamen ne povas kredi je tiuj ĉi milionoj.

S-ino Arnsfeld (ofendita): Do vi volas esti pli saĝa ol via praavo, via avo, via patro kaj mi! Vi volas pli bone scii ĉion ol tiuj ĉi homoj; eble vi ridas interne eĉ pri mi, via maljuna patrino. (Sinjorino Arnsfeld kovras ekplorante la vizaĝon per la manoj.) Ho, Dio!

Berta (rapidas al la patrino kaj ĉirkaŭprenas ŝin): Ne diru tion! Mi ja ne volas ofendi

vin, sed mi ne povas kredi je la sukceso de viaj penadoj.

S-ino Arnsfeld: Diru, Berta, ĉu vi kredas, ke sinjoro la konrektoro estas saĝa homo?

Berta: Certe, patrino.

S-ino Arnsfeld: Nun vidu, li kredas tiel firme je nia miliona heredaĵo, kiel je la evangelio.

Berta: Tio eble estas eraro. Ŝajnas al mi, ke li nur hipokritas intereson por tiu ĉi heredaĵo por ĝojigi nin.

S-ino Arnsfeld: La maljuna, honesta konrektoro hipokriti? Fi, kiel vi povas diri tion!

Berta: Patrino, lasu do tiun ĉi malagrablan heredaĵon!

S-ino Arnsfeld: Berta, vi estas senpripensa, terure senpripensa. Du milionojn! Ĉu vi do scias, kion signifas tio? Tio ne estas ja por mi. Mi ne plu faras pretendojn al la vivo. Sed vi, mia infano, vi, vi! Kion vi faros, se mi ne postlasos al vi grandan havon? Du milionojn! Mi jam vidas vin, ĉirkaŭitan de amantoj, inter kiuj troviĝas princoj kaj grafoj. Ankoraŭ tiun ĉi nokton mi sonĝis, ke estis princo ĉe mi por peti vian manon. Cetere li similis al iu. Kiu ĝi estis nur? Ha, ĝuste nun mi rememoras, li havis mienon kiel la asesoro en la unua etaĝo, kiu loĝas tie ĉi de kelkaj semajnoj. Kiel do estas lia nomo?

Berta (embarasite): Fiŝer, mi opinias.

S-ino Arnsfeld: Ĝuste, Fiŝer. Pensu, mi havas ideon. Mi petos sinjoron la

asesoron iafoje travidi la aktaĵojn. Li do povos fari al mi tiun ĉi malgrandan najbaran afablecon. Eble vi estos tiam konvinkita!

Berta: Sed, patrino, ni tute ne povas tion postuli!

S-ino Arnsfeld: Li ja ne devas fari tion senpage. Mi kompensos lin. Kaj ĉar li estas nur asesoro, li laboros pli malkare ol advokato; tiu ĉi speco ja estas abomene postulema.

Berta (subite eksaltante): Mi devas iri en la kuirejon; mi flaras ian brulan haladzon. (for, dekstren).

DUA SCENO.

S-ino Arnsfeld (sola): Mi tuj skribos al li kelkajn vortojn. (Ŝi sidiĝas apud la tablo kaj skribas) Bone, se li estas bonedukita, li ne rifuzos mian inviton. (ŝi sonorigas.)

Helene: La sinjorino sonorigis?

S-ino Arnsfeld: Portu tiun ĉi leteron al Sinjoro la asesoro Fiŝer en la unua etaĝo, kiun vi ja konas!

Helene: Kiel mian komodfakon.

S-ino Arnsfeld (mirigita): Kion vi babilas?

Helene (naiva): Nun, mi do tie loĝis antaŭe (montras supren) en la unua etaĝo. Mi ĝin do konas.

S-ino Arnsfeld: Sankta simpleco! Mi opinias sinjoron la asesoron.

Helene: Ha, ankaŭ lin mi konas. Li havas iom palan mienon.

S-ino Arnsfeld: Do, forportu tiun ĉi leteron rapide!
Helene: Jes, sinjorino! (For, tra la mezo.)

TRIA SCENO.

S-ino Arnsfeld (denove foliante en la aktoj): Mi ne scias, kiel ĝi okazas, sed tiu ĉi asesoro inspiras al mi tre grandan konfidon. (iu frapas) Eniru!
Ŝnorke (malgranda sinjoro kun arĝentblankaj haroj kaj senbarba vizaĝo, de eksterordinara movebleco kaj viva mienludo. Li aliras senceremonie sinjorinon Arnsfeld kaj donas al ŝi la manon): Bonan matenon, estimata sinjorino, bonan matenon! Bone dorminta? Mi ĝojas, ĝojas! (al Berta, kiu eniras de dekstre) Bonan matenon, fraŭlino Berta! Jam leviĝinta?
Berta (ridante): Je la dekunua, sinjor' konrektoro!
Ŝnorke (turnas sin al la aktoj kaj fervore komencas folii): Jes, jes, la finlandaj, ili estas la plej maloftaj!
S-ino Arnsfeld (mirigite): Kion vi diris, kara amiko?
Ŝnorke (fiske rigardas ŝin): Mi diras, la finlandaj dokumentaj estas la plej interesaj. Gravegaj, ekstreme gravaj, aparte gravaj.
S-ino Arnsfeld (al Berta): Jen vi aŭdas! (al Ŝnorke) Pensu nur, sinjor' konrektoro, ŝi nomas tiujn ĉi dokumentojn sensencaĵo!
Ŝnorke (terurigita): La dokumentoj almenaŭ valoras du mil markojn!

S-ino Arnsfeld: Du milionojn, sinjoro Ŝnorke, du milionojn!

Ŝnorke: Ĝuste du milionojn! Tute ĝuste, ĝustege, tute precipe ĝuste!

Berta: Sed panjo, mi do ne diris, ke tiuj ĉi dokumentoj estas sensencaĵoj, mi nur certigis, ke tiuj ĉi milionoj neniam fariĝos nia posedaĵo.

S-ino Arnsfeld (malespere): Sinjor' konrektoro! Tia malkredo! Estas terure!

Ŝnorke (deturninte sin li ree folias fervore en la aktoj. Triumfante): Unu blua, unu blua! — —

S-ino Arnsfeld kaj Berta (rigardas mirigite Ŝnorke'on).

Ŝnorke (embarasita): Jes, tute ĝuste, estimata amikino, estas terura vetero hodiaŭ, terura vetero!

(Mallonga, embarasiga paŭzo. Iu frapas.)

S-ino Arnsfeld: Eniru!

KVARA SCENO.

Fritz (eniras, faras kelkajn paŝojn, kvazaŭ li volus rapidi al Berta, subite ekmemoriĝas, haltas kaj komplimentas al sinjorino Arnsfeld): La sinjorino deziris paroli kun mi. Mi havas la honoron, prezenti min al vi. Mia nomo estas Fiŝer — asesoro.

S-ino Arnsfeld (donas al li la manon, kore): Akceptu mian sinceran dankon pro la akurateco, aŭ pli vere, pro la rapideco, kun kiu vi plenumis la deziron de maljuna sinjorino, sinjor' asesoro! Permesu, ke mi konatigu la gesinjorojn! (Sin tur-

nas al Ŝnorke) Sinjoro la konrektoro Ŝnorke, maljuna, intima amiko de nia domo.

Fritz (kliniĝas antaŭ Ŝnorke).

Ŝnorke (fikse rigardas lin senparole).

S-ino Arnsfeld (turniĝinta al Berta): Jen mia filino Berta!

Fritz (kliniĝas antaŭ Berta).

Ŝnorke (kraĉotusegas kaj rigardas sinjorinon Arnsfeld demande).

S-ino Arnsfeld (klarigante): Mi hodiaŭ skribe petis sinjoron la asesoron pri lia vizito, ĉar mi deziras de li juristan konsilon. (al Fritz) Estas pro heredaĵo.

Ŝnorke (faras nekontentan movon).

Fritz: Se mi povas servi al vi per miaj malfortaj provoj! (Li fikse rigardas Berta'on, kiu ree sidiĝis je la maldekstra fenestro.)

S-ino Arnsfeld: Sinjor' konrektoro, mi timas enui vin, se vi denove devos aŭdi la tutan enhavon de la heredaĵa afero! (al Fritz) Ankaŭ mia filino sufiĉe konas la aferon. (al Ŝnorke) Eble vi faros promenon kun Berta en la ĝardeno!

Ŝnorke (mirigata): Ĉu tio estas nepre necesa?

S-ino Arnsfeld: Mi petas, ke vi tion faru, sinjor' konrektoro.

Ŝnorke (eksaltas rapide, ĵetas ankoraŭ malkonfideman ekvidon je Fritz kaj foriras kun Berta tra la meza pordo).

KVINA SCENO.

Fritz (tenas ankoraŭ la ĉapelon en la mano kaj rigardas la pordon, malantaŭ kiu ambaŭ malaperis).

S-ino Arnsfeld: Sed mi petas, ĉu vi ne volas sidiĝi, sinjor' asesoro?

Fritz (formetas la ĉapelon kaj sidiĝas).

Sino Arnsfeld: Ĉu estas permesate, peti vin je la afableco, aŭskulti miajn detalojn? La afero estas tute simpla. — Mia edzo estis nomata Paul Arnsfeld kaj estis la filo de iu Emil Arnsfeld kaj tiu ĉi estis la filo de iu Bernhard Arnsfeld. Tiu ĉi Bernhard Arnsfeld havis kvar filojn kaj li mem havis kvar fratojn kaj lia patro estis nomata Hermann Arnsfeld.

Fritz (viŝas sia ŝviton de la frunto): Tio estas efektive treege simpla!

S-ino Arnsfeld: Aŭskultu nur ĉion! Unu el la kvar filoj de tiu ĉi viro estis nomata Eugen kaj konatiĝis kun iu sinjoro de Lassen, kiu kunprenis lin Orient-Hindujon kaj filigis lin tie. Lassen havis riĉajn posedaĵojn sur la insulo Java, ne estis edziĝinta, kaj mortante li postlasis sian tutan havon al Eugen Arnsfeld. Tiu ĉi mortis antaŭ proksimume kvardek jaroj, ankaŭ sen heredantoj. Ĉar nun Lassen ne postlasis heredantojn, sed ĉar lia duonfilo Eugen Lassen, nomita Arnsfeld, heredis de li kaj ankaŭ tiu Eugen Lassen ne postlasis heredantojn — (Paŭzo, dum kiu sinjorino Arnsfeld rigardas signife Fritz' on) Ĉu vi do komprenas min, sinjor' asesoro?

Fritz: Certe.

S-ino Arnsfeld: Jam mia mortinta edzo okupis sin pri tiu ĉi afero, kaj mi daŭrigis lian laboron. Precipe estis por mi tre grave, ricevi la naskiĝtestojn de mem-

broj el la familio Arnsfeld kaj ties parencoj. Estis necese, ke ni korespondadis tre multe kun eksterlandaj oficistaroj. Jen rigardu! (Ŝi donas al li triumfante aktaĵojn) El Rusujo!

Fritz (apenaŭ ekprenis la aktaĵojn kaj enrigardis, kiam sinjorino Arnsfeld jam donas al li aliajn).

S-ino Arnsfeld: El Svedujo! — El Anglujo! — El Sudameriko! — El Sidney! El Italujo! — El Francujo! — El Danujo!

Fritz (malaperas pli kaj pli malantaŭ la aktoj, kiujn sinjorino Arnsfeld elprenas el la ŝranko kaj transdonas al li. Li leviĝas kaj rigardas super la aktojn). Mi nur povas fari al vi mian komplimenton pro via plenbrila kaj klara rakontado, sed se mi devas definitive juĝi pri la stato de la afero, estos necese, ke mi tralegu la dokumentojn, folio post folio, kaj peco post peco!

S-ino Arnsfeld: Kaj nun vi opinias, ke tio kaŭzos al vi tro grandan penon kaj forprenos vian tempon. Sed komprenu min ĝuste: mi estas en la situacio, povi pagi vian helpon. Kaj eble ankaŭ la studado de la aktoj donos al vi konvenan okazon, vin montri kiel bona juristo.

Fritz: Ne diru tion. Volonte mi prenas sur min la aferon, ĉar ĝi interesegas min, kaj ĉar per tio mi povas pruvi al vi, sinjorino, komplezecon. Ne parolu pri pago!

S-ino Arnsfeld (ravigata): Vi do ankaŭ opinias, ke la afero havas ŝancon je sukceso?

Fritz: Preskaŭ ŝajnas al mi tiele.

S-ino Arnsfeld: Bonege. Sed mi ĵus memoras, vi ankoraŭ ne vidis la genealogian arbon de la familio Arnsfeld. Mi igis verki ĝin la lastan jaron, ĝi pendas tie en la angula ĉambro. Cu vi volas vidi ĝin?

Fritz: Kun plezuro. (Kun sinjorino Arnsfeld for maldekstren.)

SESA SCENO.

Ŝnorke (venas kun Berta el la ĝardeno tra la mezpordo. Li kuras ekscitite tien kaj reen, kaj subite haltas antaŭ Berta): Estas tre malprave de via patrino, preni en la domon fremdan homon, ne demandinte min antaŭe. Kiu estas tiu-ĉi homo? De kie li venas? Kion li volas tie ĉi?

Berta: Sinjoro la asesoro Fiŝer ne estas tute fremda al ni. Li loĝas de kelkaj semajnoj tie ĉi en la domo. Ni konas unu la alian almenaŭ vide.

Ŝnorke (tre malkvieta): Kion asesoro tie ĉi serĉas? Tie ĉi ne estas juĝejo kaj juĝistaro.

Berta: Li estas malsana kaj volas tie ĉi resaniĝi.

Ŝnorke: Malsana kiel asesoro? Ne kredeble! La rajton, esti malsana, oni havas, kiam oni estas konsilanto, sed ne kiel asesoro. (Minacante) Sed se mi ekscios ion, mi estas kapabla al ĉio. (Li forte frapas per la bastono la plankon.)

Berta (ektimigite): Ja, sinjor' konrektoro, kion vi nur havas?

Ŝnorke (ĉiun vorton forte akcentante): Ĉu vi jam parolis kun li?

Berta (embarasite): Certe.

Ŝnorke: Kion vi parolis kun li?

Berta (pli embarasite): Dio mia, kion oni parolas: pri diversaj aferoj.

Ŝnorke (kun spionanta rigardo): Ĉu li faris rimarkon, ke li havas pasion?

Berta (tute konsternite): Sinjor' konrektoro!

Ŝnorke (kaptas Berta'on je la ŝultroj): Ĉu li diris al vi, ke li kolektas? Ha!

Berta (mirigite): Mi ne komprenas.

Ŝnorke (kriegas al ŝi en la orelon): Li estas kolektanto.

Berta (trankviliĝas ree): Pri tio li ne diris eĉ unu vorton.

Ŝnorke: Ho, mi scias sufiĉe! Sed li sin gardu je mi, sin gardegu, vere treege sin gardu! (For tra la mezo.)

SEPA SCENO.

Berta (mirigite postvidas la forkuranton).

Fritz kaj Sinjorino Arnsfeld (eniras tra la pordo maldekstre).

S-ino Arnsfeld: Nun vi diru mem al mia filino, sinjor' asesoro, ke mi havas la milionojn preskaŭ jam en la poŝo.

Fritz (rapide interrompante): Ne tute, ne tute! Pardonu, sinjorino, la afero ŝajnas al mi pli komplikita ol mi kredis komence. Via genealogia arbo havas tiel multegajn branĉojn kaj branĉetojn! Mi volonte faros

la studadon de la aktaĵoj tre fundamente. Ĉu vi permesas, ke mi kunprenu la unuan aktaĵon en mian loĝejon?

S-ino Arnsfeld: Tre volonte mi donas la permeson, sinjor' asesoro.

Ŝnorke (enirante aŭdis la lastajn vortojn, baras la vojon al Fritz kaj krias) Neniam! je nenia kondiĉo! Sinjorino Arnsfeld, tion vi ne permesu! Per mia vivo mi defendos la dokumentojn.

Ĉiuj (rigardas mirigite Ŝnorke'on, kiu staras apud la pordo kun etenditaj brakoj).

S-ino Arnsfeld: Sed mi petas vin, sinjor' konrektoro, kial tiu ĉi ekscito? Ankaŭ mi ja preferus, se sinjoro la asesoro ŝparus al si la penon de la tienportado kaj reenportado de la aktaĵoj kaj bonvolus travidi ilin en mia loĝejo. Tamen mi ne komprenas —

Ŝnorke: Via opinio estas la ĝusta. Tie-ĉi la aktaĵoj devas esti travidataj. Ne unu peco, ne unu folio de papero devas esti ŝtelata. Pripensu, se io perdiĝus, tute sen intenco de sinjoro la asesoro, per fajro, hajlvetero, superakvego, malkresko, pesto — la plej granda malfeliĉo povus deveni el tio.

S-ino Arnsfeld (ridetante): Mi certe ne estas tiel timema kiel vi, sinjor' konrektoro, sed (al Fritz) kion vi opinias, sinjor' asesoro? Ĉu vi volas travidi la aktaĵojn tie ĉi en mia loĝejo?

Fritz: Via deziro estas ordono por mi. (Li ekprenas sian ĉapelon kaj riverencas al sinjorino Arnsfeld kaj Berta). Mi per-

mesos al mi reveni morgaŭ matene. (For tra la mezo.)

OKA SCENO.

Ŝnorke (folias nervoze en la aktaĵoj; la sinjorinoj foriĝis kapskuinte dekstren): Anglujo mil okcentkvardek! Malofta, tre malofta, vere ekstraordinare malofta! Kvincent markojn inter fratoj! Mi havas la certan konvinkon, ke li estas kolektanto. Ĉiuokaze mi petis telegrafe sciigojn de mia filo en la ĉefurbo. Li do devas scii, kion valoras tiu ĉi ventanima asesoro. Bone, tre bone, vere treege bone! Brazilio, milokcentkvardektri! Sescent markojn! — Li havas maltrankvilajn okulojn, strangan konduton! Mi povas konfidi mian homkonadon. Tian mienon nur havas kolektanto! Sed li ekkonos min! — Grandioze, tre grandioze, vere treege grandioze! Finlando, milokcentkvardekkvin! Mil markojn! Li aŭ mi! La vivo aŭ la morto! Bavarujo, milokcentkvardeknaŭ! Tie ĉi mi devas trovi elturniĝon (li metas la manon sur la frunton) Meditu, Ŝnorke, rememoru! Kiel estis do nur la afero rilate al la scienculo el Dorpat, kiu venis Berlinon, por akiri lunoglobuson de la vidvino de astronomia kolego? Kion li faris, kiam la vidvino rifuzis la vendon de la valoraĵo? (Eksaltante.) Ho, kion li faris? (Li dancas en la ĉambro) Heŭreka!

Helene (restas momenton apud la pordo kaj rigardas la strangan konduton de Ŝnorke)

NAŬA SCENO.

Helene (kunpusiĝas kun Ŝnorke): Kia maltrankvileco en la domo, de kiam la asesoro Fiŝer loĝas en la etaĝo super ni! La maljuna konrektoro estas tute ekscitita, de kiam la Asesoro estas tie ĉi. Mi bone povas imagi, kial. La filo de la maljuna sinjoro supoze deziras fariĝi nia bofilo; antaŭe mi audis paroleti iam pri tio. Sed tio ne okazos, mia kara sinjoro Ŝnorke. Berta ne fariĝos sinjorino Ŝnorke: ŝi fariĝos sinjorino Fiŝer, mi certe scias tion. Hieraŭ li renkontis ŝin en la ĝardeno kaj li nomis ŝin „ci“ kaj eĉ kisis ŝin. Ho, mi povas silenti. Unu markon li premis al mi en la manon. Nobla sinjoro, sinjoro la asesoro!

DEKA SCENO.

Sinjorino Arnsfeld kaj Berta (eniras de maldekstre).

S-ino Arnsfeld: Helene, iru ankoraŭ unu fojon al sinjoro la asesoro Fiŝer; mi petas lin je mallonga interparolo. (Al Berta) Sciu, mi devas do diri al li kelkajn vortojn de senkulpigo. La konrektoro estis tro stranga. Kion li nur havis? Cetere ankaŭ vi povus esti pli afabla al la asesoro; mi kredas, ke vi jam ne parolis unu vorton kun li. Li plaĉas al mi treege. Li havas ion solidan, konfidigantan en sia karaktero. Sed verŝajne vi estas malfavora al li de antaŭe nur tial, ĉar li interesiĝas pri la heredaĵo. Mi petas vin,

mia infano, estu afabla al li. Ĉu vi volas tion promesi al mi?

Berta (kun stranga akcento); Mi tion promesas al vi, patrino.

S-ino Arnsfeld: Vidu, certe mi ne estas superstiĉa, tamen la sonĝo de tiu ĉi nokto surprizigis min!

Berta: Kia sonĝo?

S-ino Arnsfeld: Aŭskultu! Jen! Alproksimiĝis elefantoj, riĉe ornamitaj per ora bridaro kaj juveloj, akompanitaj de sescent brunaj kaj nigraj servistoj, portantaj grandajn ventumilojn sur altaj stangoj, portantaj orajn kaj arĝentajn vazojn, palmbranĉojn kaj florantajn kreskaĵojn. La sekvantaro, vestita per oraj teksaĵoj kaj juvelornamitaj turbanoj, alproksimiĝis en solena procesio, dum hindaj dancistoj kaj iluziistoj sekvis al ili kaj dum eksonis bruanto muziko de fremdaj instrumentoj. Tiam alproksimiĝis kameloj akompanataj de beduenoj, kaj elefantoj kaj kameloj estis ŝarĝitaj per oro, — per oro, — per senfina oro! Kaj ĉiuj la brunaj, flavaj kaj nigraj akompanantoj de la procesio ekkriis: Vivu sinjorino Arnsfeld! Vivu la heredantino de la milionoj!

Berta: Patrino, la lakto superfluas! (Rapide for, dekstren. — Iu frapas.)

S-ino Arnsfeld: Eniru!

DEKUNUA SCENO.

Fritz (enirante kun riverenco): Vi venigis min, sinjorino!

S-ino Arnsfeld (iras renkonte al li kaj donas al li la manon): Mi ŝuldas do al vi klarigon. (Ŝi donas al li signon; li sidiĝas.) Nia maljuna amiko Ŝnorke estas bonkora homo, tamen li havas strangajn kutimojn, kiuj ofte donas malĝustan impreson pri li. Li gardas la aktaĵojn kiel trezoron, kaj kiam li vidis, ke vi volis forporti pecon da ili, li estis treege ekscitita. Tial ne koleru!

Fritz: Neniel! mi konformiĝas tute al viaj aranĝoj. Se estas agrable al vi, mi travidos la unuan aktaĵon ĉi tie dum via ĉeesto.

S-ino Arnsfeld: Mi estas tre danka al vi. Nun mi volas forlasi vin, por ke vi povu labori sen malhelpo. Vi do permesas al mi, ke mi sendu al vi per mia filino kelkajn refreŝaĵojn?

Fritz (kliniĝas senparole).

S-ino Arnsfeld (forlasas la ĉambron, irante sur la piedpintoj).

Fritz (folias en la aktaĵoj).

DEKDUA SCENO.

Fritz (sola): Ĉu mi nun estas feliĉa aŭ malfeliĉa? Mi efektive ne scias. Tiom, kiom en la lastaj semajnoj, neniam en mia tuta vivo okazis. Unue la disputo kun S-ro von Kolb, poste la duelo, dum kiu mi lin danĝere vundigis. Poste la forkuro el la ĉefurbo en nokto kaj nebulo, sen adiaŭo de mia bona patrino, kun falsaj paperoj en la poŝo, kaj nun eĉ tie-ĉi en la trankvila banloko, havante la

nomon de asesoro Fiŝer, aminduminte la filinon de l' domo. Kiel ĉio finiĝos? Tio timigas min, kiam mi ĝin pripensas. Kiam mia dolĉa Berta sciiĝos, ke mi trompis ŝin, ke mi tute ne estas la asesoro Fiŝer, sed Fritz von Bielaŭ persekutata police pro duelo, tiam ŝi malestimos min, ŝi forpuŝos min de si. — Ne, tion ŝi ne faros. Ŝi aŭskultos min, ŝi pardonos al mi, kiam mi diros al ŝi, ke —

DEKTRIA SCENO.

Berta (subite eniras; ŝi portas breton kun glaso da vino kaj kelkaj fruktoj, iras al la tablo kaj surmetas la breton): Mia patrino petas vin, sinjor' asesoro . . .

Fritz (rapide eksaltante ĉirkaŭprenas Berta' on per siaj brakoj): Berta, mia dolĉa knabino! (Li kisas ŝin) Diru al mi, ke vi amas min, kaj mi estas la plej feliĉa homo en la mondo.

Berta: Ho, jes!

Fritz (ĉirkaŭprenas ŝin furioze): Benata estu la sorto, mi volis diri sinjoro Eugen Lassen, nomita Arnsfeld, kiu kaŭzis tiun-ĉi aktaĵan aferon! Vi ne scias, kion mi suferis de tiu horo en la ĝardeno, kiam vi forkuris el miaj brakoj kvazaŭ fortimigita kapreolo. Mi esperis je via amo, sed enirinte tien-ĉi la unuan fojon premantaj duboj ekturmentis mian koron. Vi evitis intence miajn rigardojn; mi ne sciis, kion pensi. Tamen nun vi estas la mia.

Post malmultaj tagoj mi petos vian manon de via patrino.

Berta: Ho jes, faru tion! Mi neniam havis sekreton je mia patrino! Mi malkaŝos min je la unua okazo.

Fritz: Mia dolĉa knabino! (Li volas ree ĉirkaupreni ŝin. Iu frapas. Ambaŭ ektimigite disiĝas.)

DEKKVARA SCENO.

Ŝnorke (eniras, frake vestita, kun blanka kravato kaj ordenrubando, la cilindran ĉapelon en la mano. Li rigardas malkonfideme la asesoron, kiu folias ŝajne fervore en aktaĵo. Al Berta): Mi venas je nekutima horo; sed mi havas miajn motivojn. Ĉu mi povas paroli kun sinjorino via patrino?

Berta: Panjo estas en la kuirejo. Mi sciigos ŝin tuj. (Si foriras dekstren.)

Ŝnorke (observadas malamikeme la asesoron, tiam li forprenas de la tablo unu aktaĵon post la alia kaj metas ilin en la ŝrankon).

Fritz (observas mirigite la konrektoron).

S-ino Arnsfeld (eniras tra la dekstra pordo).

Ŝnorke (iras renkonte al ŝi kelkajn paŝojn kaj riverencas): Altestimata sinjorino, ĉu vi eble havus la bonecon, permesi al mi paroli sole kun vi kelkajn vortojn?

S-ino Arnsfeld: Mi vin petas, sinjor' asesoro, bonvolu sidiĝi kelkan tempon en

la apuda ĉambro! Mia filino restos dum tiu tempo en via societo. (Ambaŭ foriras maldekstren.) Nun, sinjoro, nun ni estas solaj, kaj vi povas klarigi al mi, kial vi postulis aŭdiencon tiamaniere solene.

Ŝnorke (metas la ĉapelon sur seĝon, aliras al la tri pordoj kaj esploras, ĉu ili estas fermitaj firme; tiam li starigas sin post seĝo, ŝovas la dekstran manon inter surtuto kaj veŝto kaj komencas per strange mallaŭta voĉo): Tre estimata sinjorino Arnsfeld! Ne estas bone, ke la homo estu sola, kaj kion la ĉielo kunigas, tion la homo ne devas disigi. Mi petas vian manon! Konfidu al mi, por ke ni poste povu iri unuigite tra la vivo kaj en reciproka amo kaj estimo travivu la tagojn, kiujn la ĉielo donacas ankoraŭ al ni.

S-ino Arnsfeld (fikse rigardas lin senparole).

Ŝnorke (forviŝas la ŝviton de la frunto): Eble vi estas surprizita per la vortoj, kiujn mi diris al vi. Mi petas tial, pripensu trankvile mian proponon! Post du aŭ tri tagoj mi permesos al mi aŭdi la respondon. Ĝis tiam mi atendos en sopiro kaj espero kiel via fidela kaj sindona amiko kaj, se la ĉielo kaj vi tion volas, ankaŭ kiel via estonta edzo!

S-ino Arnsfeld (starigas sin rektege antaŭ Ŝnorke kaj rigardas lin riproĉe): Mi ne estus atendinta, sinjoro, ke vi igas min objekto de insultega spekulacio. Mi divenas vian planon. Ne al mi apartenas

via amo, sed al miaj milionoj. De sinjoro asesoro Fiŝer vi scias, ke mi heredos tiujn-ĉi milionojn. Ho sinjor' konrektoro, hontu! Mi ne kredis vin kapabla de tia ago.

Ŝnorke (tute malkuraĝinta): Tion vi povas kredi de mi? Ho, kiel maljuste vi traktas min. Neniam en mia vivo mi kredis tion, ke vi povas heredi iam milionojn kaj ankaŭ nun mi ne kredas tion.

S-ino Arnsfeld: Tio estas neaŭdite! Tian mensogon vi riskas diri al mi. Vi neniam kredis je miaj milionoj kaj ĉiutage vi parolis kun mi pri ili, ĉiutage vi trafoliis tiujn-ĉi aktaĵojn kun vere fanatika intereso! Kaj neniam vi kredis je ili? Tiel mia plej kara ĝisnuna amiko estas hipokritulo, kiu en tia frivola maniero ofendas kaj insultas min, min, sendefendan, maljunan virinon. (Ploregante ŝi foriras dekstren.)

DEKKVINA SCENO.

Ŝnorke (volas sekvi al sinjorino Arnsfeld sed haltas duonvoje).

Fritz kaj Berta (venas de maldekstren).

Ŝnorke (iras al Fritz, rigardas lin, malfermas la buŝon, kvazaŭ li volus paroli, skuas la kapon kaj fine foriras tra la meza pordo).

Fritz (postvidas al li). Aŭdu, Berta, via bona konrektoro iom ŝajnas freneza. (Li montras al la frunto.)

Berta: Preskaŭ ŝajnas tiel ankaŭ al mi. Mi tuj devas vidi, kiel fartas panjo. Mi kredas, mi aŭdis ŝin ĝemi. (for dekstren.)

Helene (tra la meza pordo): Sinjoro, alvenis telegramo por vi. (donas la telegramon.)

Fritz: Atendu momenton! (Li legas, ektimas ĝoje, rigardas la horloĝon, poste sian monujon, tiam denove la horloĝon. Al si mem): Mi devas peni atingi la vagonaron, aŭ almenaŭ sendi sciigon al mia patrino. (Laŭte al Helene) Havigu al mi tuj fiakron. (Premas trinkmonon en ŝian manon kaj rapidegas for tra la meza pordo.)

Helene: Nu! Tio ja estas stranga! Aŭ li gajnis la grandan loton, aŭ okazis io alia grava. Nu, estas indiferente al mi! (For tra la mezo.)

DEKSESA SCENO.

S-ino Arnsfeld (de dekstre, sekvata de Berta): Ne, mi ne povas diri ĝin al vi, tio estas tro terura! (Ŝi kaŝas la vizaĝon per la manoj.)

Berta: Al via propra filino vi do povas konfidi.

S-ino Arnsfeld: La homoj ĉiuj estas malbonaj kaj hipokrituloj. Eĉ tiuj, kiuj ŝajnas al ni plej intimaj amikoj, trompas nin en malica maniero. (Ŝi sidiĝas sur seĝo.)

Berta (ektimigite genufleksas antaŭ sinjorino Arnsfeld kaj ĉirkaŭprenas ŝiajn

genuojn): Pardonu, panjo, ni ne volis trompi vin. En la plej proksimaj tagoj ni volis sciigi ĉion al vi. Mi amegas lin tiom, patrino, mi ne povas agi alie!

S-ino Arnsfeld (senmezure mirigite): Kion vi diras? Kiun vi amas? La maljunan hipokritulon, kiu jam staras en la tombo per unu piedo, kaj kiu volas enŝteli sin en nian familion por ricevi niajn milionojn?

Berta (terurigite): Sed, panjo, vi do mem diris, ke li impresis tiel konfidinde al vi, kaj ke mi devas esti tre aminda al sinjoro la asesoro.

S-ino Arnsfeld: La asesoron? Lin vi amas? Jes, tio estas alia afero. Venu al mia koro, mia bona infano. (Ŝi leviĝas kaj ĉirkaŭprenas ŝin.) Kiamaniere tio okazis tiel rapide, kaj kie li estas?

Berta: Verŝajne li ĵus foriris. Eble Helene scias! —

S-ino Arnsfeld (sonorigas).

Helene (aperas en la pordo).

S-ino Arnsfeld: Ĉu vi scias, kien iris sinjoro Fiŝer?

Helene: Li ricevis telegramon kaj rapide forveturis.

S-ino Arnsfeld kaj Berta (rigardas mirigite unu la alian).

S-ino Arnsfeld (al Helene): Sufiĉas, vi povas iri.

DEKSEPA SCENO.

Ŝnorke (eniras tre ekscitite): Mi ne kredis, ke mi revenus denove en tiun-ĉi domon,

sed kiel kristano mi havas la devon ŝirmi du sendefendajn virinojn kontraŭ malfeliĉo kaj danĝero. (per laŭta voĉo) La asesoro Fiŝer estas trompulo; li ne estas nomata Fiŝer, sed de Bielau, kaj estas serĉata de la polico jam de semajnoj.

Berta (kun ekkrio falas sur la sofon).

S-ino Arnsfeld (ekleviĝas terurigite).

Ŝnorke: Ĵus la loĝejo estas malfermigita de la polico, sed la birdo jam elflugis. Verŝajne li nur venis ĉi-tien por ŝteli gravajn paperojn.

S-ino Arnsfeld: Ho, mia dio, miaj dokumentoj! (Ŝi ekrigardas timigite la malplenan tablon.) Li forportis ĉiujn! Ho, miaj milionoj, miaj milionoj!

Ŝnorke: Trankviliĝu! Mi forprenis kaj metis ilin en la ŝrankon. Ĉu eble mankas unu aŭ du, tion mi ne povas certigi. (Li malfermas la ŝrankon kaj metas rapidege la dokumentojn sur la tablon.)

S-ino Arnsfeld (sin okupas pri sia filino, kiu duonkuŝas svene sur la kanapo): Retrankviliĝu, mia filino! Mi ja estas ĉe vi. Forgesu lin, li estas ne inda de via amo, la trompulo!

Ŝnorke (ekkrias): La finlanda dokumento mankas! (Ekkomencas terura tumulto. La tri ĉeestantaj personoj samtempe krias ekscitite. S-ino Arnsfeld kaj Ŝnorke trakuras la ĉambron mantordante.)

Berta (leviĝas duone apud la sofotablo).

Samtempe.

Ŝnorke: La Finlanda dokumento de milokcentkvardekkvin. La trompulo! Estas terure! Valoras mil markojn!

S-ino Arnsfeld: La finlandaj dokumentoj! Ili estas decidigaj por la tuta heredaĵo! Ho, miaj milionoj!

Berta: Ne estas eble; Fritz ne povas esti trompulo! Malfeliĉa eraro! Ho dio! ho dio!

DEKOKA SCENO.

Ŝnorke (al S-ino Arnsfeld): Mi pardonas al vi ĉion, kion vi faris al mi, sed ke vi akceptis tian trompulon kun tia afableco, tion mi pardonos al vi neniam, neniam! Se ankaŭ estas perditaj la du milionoj, ilin oni eble povos anstataŭigi.

S-ino Arnsfeld: Du milionojn, sinjoro konrektoro, du milionojn?

Ŝnorke: Ilin oni povas anstataŭigi, mi diras al vi, per diligenteco kaj ŝparemeco, per loteria gajno, per almozkolekto.

S-ino Arnsfeld: Kion nesaĝan vi pensas! Vi perdis la saĝon!

Ŝnorke: Sed finlanda poŝtmarko de milokcentkvardekkvin estas neanstataŭigebla, nepre neanstataŭigebla, nepre neanstataŭigebla, tute neanstataŭigebla! (Tute lacigite li falas sur seĝon.)

S-ino Arnsfeld (mirigita): Poŝtmarko? Mi ne komprenas vin, sinjoro konrektoro.

Ŝnorke (eksaltante): Vi ne komprenas min, ĉar vi ne konas la koron de kolekt-

anto (solene). Neniam mi aspiris mondan posedaĵon, neniam mi serĉis gloron kaj honoron, nur unu pasion mi havis: kolekti poŝtmarkojn!

S-ino Arnsfeld (miregante): Poŝtmarkojn?

Ŝnorke: Ĉiufoje, kiam mi enigis novan markon en mian kolekton, ŝajnis al mi, kvazaŭ mia potenco pligrandiĝis, ke mi fariĝis guvernisto en malproksimaj kolonioj, reĝo sur solecaj insuloj. — Kiam vi permesis al mi la unuan fojon envidi en tiujn aktojn, ŝajnis al mi, kvazaŭ la pordoj de l'paradizo estas malfermitaj por mi. (Entuziasme). Ĉio maloftaĵoj, markoj tre maloftaj, tute maloftaj! Ho, sinjorino Arnsfeld, mia koro estis kunigita kun tiuj poŝtmarkoj, ĉiutage mi devis vidi ilin, ĉiutage trafolii tiujn aktojn, ĉiutage ĝojigi miajn okulojn kaj mian koron pri brilo de tiuj maloftaĵoj. Sed ilia posedo ne estis atingebla por mi. Elspezi por ili kelkajn mil markojn, por tio mia tera posedaĵo ne sufiĉas. Sed tiujn markojn, de kiuj vi ne konis la valoron, forpreni al vi por bagatelo, tion ne permesis mia honesteco. Longtempe mi batalis kontraŭ mi mem, sed hodiaŭ, kiam mi vidis fosi alian en tiuj trezoroj, mi decidis prezenti al vi mian koron, en kiu vi ja loĝis jam longe en formo de poŝtmarkoj ekstraordinare maloftaj. -- Mi esperis, ke vi pripensos mian proponon, — la sorto decidis alie — jen la malfeliĉo! (ekĝemegante) Finlando de milokcentkvardekkvin! Neniam

tiuj-ĉi okuloj revidos vin! Ho, tio estas mia morto!

DEKNAUA SCENO.

Helene (eniras en la ĉambron): Rapidsendito alportis tiun-ĉi leteron por sinjoro konrektoro. (foriras tra la mezo.)

Ŝnorke (malfermas la leteron kaj legas): Mi kredas, ke la enhavo de tiu-ĉi letero estas grava ankaŭ por la familio Arnsfeld. Aŭdu, kion mia filo skribas al mi el la ĉefurbo. „Kara patro! Asesoro Fiŝer, pri kiu vi skribis al mi, estas mia amiko kaj studkolego Fritz von Bielau. Li enloĝiĝis sub falsa nomo ĉe vi por eviti la konsekvencojn de duelo. Sed la afero estas forigita per distinga persono, kion mi hodiaŭ matene komunikis al mia amiko. Estas domaĝe, ke li ne elektis alian pseŭdonimon, ĉar iu asesoro Fiŝer ĝuste nun estas arestletere persekutata pro grandaj trompraboj. Espereble tio ne kaŭzos al li malagrablaĵojn. Kolektanto de poŝtmarkoj, kiel vi supozas, Fritz tute ne estas. Almenaŭ mi neniam rimarkis tiajn emojn de li. Kore salutante mi restas via fidela filo Max.“

Berta (leviĝas ekĝemante de l'sofo jak aliras sinjorinon Arnsfeld): Patrino, vi faris grandan maljuston al Fritz, vi nomis lin ĉarlatano.

Ŝnorke (sin ĵetegas kiel tigro al la sofo kaj relevas de l'sidloko de Berta aktaĵon):

Ha, savita!! (Alsaltas Berta'on) Vi savis finlandon. Mi tion neniam forgesos al vi. (Li ĉirkaŭprenas ŝin).

DUDEKA SCENO.

Fritz (kun ĉapelo kaj vojaĝpoŝo eniras la ĉambron): Sinjor' konrektoro, kion signifas tio? Kiel vi povas permesi al vi, ĉirkaŭpreni mian fianĉinon?

Berta (ĉirkaŭprenas Fritz'on): Fritz, ho mia Fritz!

S-ino Arnsfeld: Vi ŝuldas al mi klarigon, sinjor' asesoro — sinjoro von Bielau. Ĉu vi eble tute ne estas asesoro?

Fritz: Ne. Tute ne!

S-ino Arnsfeld: Ĉu vi ankaŭ ne estas nomata Fiŝer?

Fritz: Ankaŭ ne!

Ŝnorke: Ĉu oni ne arestis vin?

Fritz: Dank' al Dio, ne!

Ŝnorke: Ĉu vi ne kolektas poŝtmarkojn?

Fritz: Neniam!

Berta: Vi ne estas trompulo?

Fritz: Sed Berta! —

Berta: Sinjoro la konrektoro opiniis —

Fritz: Sinjoro, kion vi kuraĝas?! Vi ĉirkaŭprenis mian fianĉinon?

Ŝnorke: Jes!

Fritz: Vi min nomis trompulo?!

Ŝnorke: Jes!

Fritz: Vi do ŝuldas al mi duoblan klarigon!

Ŝnorke: Jes! Jen vi ĝin ricevos. Unue la finlanda dokumento malaperis kaj tiam mi opiniis, ke vi ĝin igis akompani vin, tial mi vin nomis trompulo. Due fraulino Berta sidis sur la priparolita dokumento, kaj pro tio mi ŝin ĉirkaŭprenis. Kaj ankoraŭ unu demandon! Ĉu vi scias, kion valoras finlanda poŝtmarko de milokcentkvardekkvin?

Fritz: Ne, kiel mi scius . . . .?

Ŝnorke (metas al li koverton sub la nazo): Jen ĝi estas! Mil markojn inter fratoj!

Fritz: Sed mi ne komprenas . . . .

S-ino Arnsfeld (al Fritz): Al mi vi ŝuldas ankoraŭ klarigon.

Fritz: Jes, sinjorino! Vi rajte suspektis min fripono, kiu gajnis vian konfidon per falsa titolo; sed kiam vi scios, kial mi faris tion, kial mi devis fari tion, vi juĝos milde.

S-ino Arnsfeld: Mi scias, vi volis eviti la konsekvencojn de duelo.

Fritz (mirigite): De kie vie scias tion?

Ŝnorke: Jen la letero de mia filo, legu! (donas al li la leteron).

Fritz (leginte le leteron, ĝoje): Vi estas la patro de mia amiko Max Ŝnorke?

Ŝnorke: Certe tio estas mi!

Fritz: Permesu, ke mi ĉirkaŭprenu vin, estimata sinjoro! (Li ĉirkaŭbrakas lin.)

Ŝnorke (al sinjorino Arnsfeld): Nun, mi pensas, ne estas necese, doni al sinjoro

von Bielau la ceterajn klarigojn (li starigas sin denove teatrale). Ne estas bone, ke la homo estu sola kaj kion la ĉielo kunigas, tion la homo ne devas disigi. Mi petas la manon de fraŭlino via filino (paŭzo) por sinjoro Fritz von Bielau!

Fritz: Vi estas la plej ĉarma poŝtmarkonklo, kiun mi iam ekkonis!

S-ino Arnsfeld (al Fritz): Mi devus koleri al vi, pro la maltrankvileco kaj eksciteco, kiun vi kaŭzis; sed pri la lasta motivo sinjoro la konrektoro estas prava: kion la ĉielo kunigas, tion la homo ne devas disigi. Prenu mian filinon kaj estu feliĉa kun ŝi. Ĉu vi ricevos la milionheredajon, tio ŝajnas al mi nun do iom duba. (Ŝi manpremas Ŝnorke'on.)

Fritz kaj Berta (ĉirkaŭprenas unu la alian).

S-ino Arnsfeld (al Ŝnorke): Kara amiko, pardonu al mi la suspekton, kiun mi havis pri la sincereco de via karaktero kaj akceptu ĉiujn poŝtmarkojn, kiujn enhavas tiuj-ĉi aktaĵoj, kiel donacon, kiel signon de la dankemeco por la simpatio, pruvita ĉiam al mia familio.

Ŝnorke: Vi igas min la plej granda feliĉulo en la mondo, kara sinjorino! Lasu vin ĉirkaŭpreni. (Li ĉirkaŭprenas ŝin.)

DUDEKUNUA SCENO.

Helene (eniras kaj haltas mirigite): Nu, tiam oni do povas gratuli? (riverencas

maldekstren) Sinjorino! (riverencas dekstren) Sinjor' asesoro! Mian plej koran gratulon!

S-ino Arnsfeld (ŝovas la konrektoron flanken): Kion vi volas, Helene?

Helene: La aktisto Paulmann en la dua etaĝo demandas, ĉu sinjorino volas vendi malnovajn poŝtmarkojn al li. Li aŭdis . . .

S-ino Arnsfeld: Pri tio li parolu kun sinjoro Ŝnorke!

Ŝnorke (premas kun komika teruro la finlandan aktaĵon al la koro): Ne por du milionoj!

FINO.

Eldonejo:

Heckners Verlag, Wolfenbüttel

(Germanujo)

Universo. Internacia revuo por la belo. Redaktita de D-ro Albert Schramm, jare . . . 6,— Mk. = 3,— Sm.

Rund um die Welt. Eine Zeitschrift für Esperantisten. Jährlich 12 Hefte. Redigiert von Professor Dr. S. Lederer
3,— Mk. = 1,500 Sm.

Esperanta Stenografio laŭ la sistemo de F. X. Gabelsberger verkis D-ro A. Schramm
0,50 Mk. = 0,250 Sm.

Esperantaj poŝtkartoj:
100 belaj, artefaritaj, multkoloraj
5,— Mk. = 2,500 Sm.

100 belaj poŝtkartoj „Nova Stelo“
3,— Mk. = 1,500 Sm.

III-C-9

Eldonejo:

Heckners Verlag, Wolfenbüttel

(Germanujo)

Schramm. Lehrbuch der internationalen Hilfssprache „Esperanto“ 22. Auflage . 1,— Mk. = 0,500 Sm.

Schramm. Schlüssel zum kurzgefaßten Lehrbuch der internationalen Hilfssprache Esperanto . . . . . 0,50 Mk. = 0,250 Sm.

Schramm. Fortbildungsbuch für den Esperanto-Unterricht 1,— Mk. = 0,500 Sm.

Schramm. Schlüssel zum Fortbildungsbuch für den Esperanto-Unterricht . . . . 0,70 Mk. = 0,350 Sm.

Blachstein. Die Esperantosprache im deutschen Munde 0,25 Mk. = 0,120 Sm.

Blachstein. Das Grundgesetz des Esperanto . . 0,25 Mk. = 0,120 Sm.

Heckners Esperanto-Schlüssel (Grammatik u. kleines Wörterbuch Deutsch-Esperanto 0,10 Mk. = 0,050 Sm.